

---

## 人身受け難し

### *Estas malfacile ricevi la homan korpon*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

---

「人身受け難し、いますでに受く。仏法聞き難し、いますでに聞く。この身今生において度せずんば、さらにいづれの生においてかこの身を度せん。大衆もろともに、至心に三宝に帰依し奉るべし。」

これは、大内青巒（1845-1918）が編纂した三帰依文の冒頭の一節です。日本では宗派を問わず広く読まれていますので、御存知の方も多いでしょう。

人間として生まれるのは有り難い、めったにないことである、さらに人間として仏法に出あうということはいつそう難しいことである、と。このことを『雑阿含経』では盲亀浮木（もうきふぼく）という喩えを使って説明しています。

ある時、釈尊が「たとえば大海の底に一匹の盲亀がいて百年に一度、波の上に浮かび上がるのだ。ところがその海に一本の浮木が流れていて、その木の真ん中に一つの穴がある。百年に一度浮かぶこの亀が、ちょうどこの浮木の穴から頭を出すことが一度でもあるだろうか」と尋ねられました。弟子の阿難は「そんなことはほとんど考えられません」と答えると、釈尊は「誰でも、そんなことはあり得ないと思うだろう。しかし、全くないとは言い切れぬ。人間に生まれるということは、今の喩えよりも更に有り難いことなのだ」

"Estas malfacile ricevi la homan korpon en tiu ĉi mondo, kaj tamen mi ja ricevis ĝin. Estas malfacile renkonti la budhan darmon, kaj tamen mi ja renkontis ĝin. Se mi ne estos savita dum tiu ĉi vivdaŭro, post kiom da renaskiĝoj mi povus savi min? Mi elkore ĵuras estimi la tri juvelojn kaj vivi surbaze de ili kune kun homoj."

Tiu ĉi estas la komenca parto de "La Tri Rifuĝoj" kompilita de Oouti Seiran (1845-1918). Ĉar ĝin oni legas en ĉiu tradicio en Japanio, multaj el vi konas ĝin, ĉu ne?

Estas malfacile, do tre malofte, naskiĝi kiel homo, kaj estas ankoraŭ pli malfacile renkonti la budhan darmon. Tion ĉi Ŝakja-munio eksplikis uzante la fablon pri blinda testudo.

Iam Ŝakja-munio demandis: "Unu blinda testudo loĝas en la profundo de oceano. Ĝi surakviĝas ĉiun centan jaron. Cetere unu ligno kun unu truon en sia mezo flosas sur la oceano. Ĉu la testudo iam metos sian kapon en la truon de la ligno eĉ unu fojon?" Ananda respondis: "Ne, tio estas preskaŭ neniam okazos." Ŝakja-munio diris: "Ĉiuj pensas, ke tio ne povas okazi. Sed oni ne povas diri, ke tio absolute neniam okazos. Naskiĝi kiel homo estas ankoraŭ pli malofte."

とおっしゃっています。

木村資生（1924-1994）という生物学の先生は、「我々が今、この世に生きているということは、一億円の宝くじが毎年毎年百万回当たるぐらいの奇跡だ」とおっしゃっています。自然科学的にいえば、時間的にも空間的にも膨大な因子の組み合わせで、奇跡的に人間としての生命を得ることができたのだ、ということです。

そのように貴重な命を受けたにもかかわらず、私たちはそれを実感していません。当たり前だと思っています。自分が人間である、ということに無自覚になっているのではないのでしょうか。

人間であるという事実は、それがいくら奇跡的な出来事であっても、いくら有り難いことであったとしても、そのことに無自覚であるならば、「豚に真珠」です。実際に真珠とは比べ物にならぬぐらいの宝を有していながら、その価値が分からないのが実際ではないのでしょうか。

人間として生まれた以上、人間としての生き方を全うしなくてはならないはずですが、人間としての生き方を全うするとは、「私は何のために生まれてきたか」に対する解答を見出し、人間らしい人間になることだと思います。しかし、それは「完全無欠の人間になる」ということとは違います。そのような人間はいないのであります。

生きる、というからには、そのゴールは死です。死に向かって一歩一歩進んでいるのが現実です。百歳の長寿であっても、二十歳の短い人生であって

Kimura Motoo (1924-1994), biologo, iam diris: "Estas mirakle, ke ni vivas en tiu ĉi mondo tiom, ke iu gajnas per loterio cent milionojn da enoj sinsekve milionojn da fojoj." Se diri natursciencoj, ni mirakle gajnis homan vivon per la kombino de tempe kaj space nekalkuleble multege da faktoroj"

Tiel valoregan vivon ni gajnis; ni tamen ne havas realan senton pri tio ĉi sed konsideras nian vivon kiel ordinaran aferon. Ni estas senkonsciaj pri tio, ke ni estas homoj, ĉu ne?

La fakto, ke ni estas homoj, per si mem estas, se ni ne estas konsciaj pri tio, sama kiel "perlo por porko", kiel ajn tio estas malofta kaj mirakla afero, Nekompareble pli valoran trezoron ol perlon ni efektive posedas. Sed en realo multaj el ni ne scias la valoron.

Ĉar ni naskiĝis kiel homo, ni devas plenumi la homan vivon. Kion do signifas "plenumi la homan vivon"? Mi pensas, ke tio estas trovi respondon al la demando "Por kio ni naskiĝis?" kaj fariĝi la humana homo. Sed tio ne signifas fariĝi perfekta kaj senmanka homo, ĉar tia homo ne povas ekzisti.

Ni vivas; do tio finfine kondukas al morto. En la realo ni antaŭeniras al morto paŝon post paŝo. Ĉu centjaraĝa longa vivo, ĉu dudekjaraĝa mallonga vivo, la fakto ke ni antaŭeniras al morto neniam ŝanĝiĝas.

も、その事実が変わりはありません。

問題は、今此処でどの方向に歩みを進めていくのか、また、何をよりどころとしていくのかということです。私たちは確実に老病死に至る存在であるのに、その事実から目を背けたり、不自然に逃げ回ろうとしたり、あるいは悲嘆にくれたりします。まことに「ただ徒に生まれ、徒に死を繰り返している」（道元）、「空しく過ぎていく」（親鸞）人生であるといわなくてはなりません。

三帰依文は続けて、「仏法聞き難し、いますでに聞く」とも言っています。聞き難く遇い難い仏法であるのに、私たちは幸いにして既に出遇うことができた、というのです。つまり、釈尊によって道は既に示されている、それは私たちの上に明らかにされているのです。すると問題は、私たち自身が、自分の今までの生き方をよしとするのか、それとも仏言に従って新たな生き方を選ぶのか、ということになります。私たちはその選択を迫られています。

「この身今生において度せずんば、さらにいずれの生においてかこの身を度せん。」

今しかないのです。いずれそのうち、とっているうちに人生が空しく過ぎ、生死流転に沈み込んでいきます。さあ、歩みを始めましょう。

La problemo estas en tio, al kiu direkto ni ekpaŝu nun kaj ĉi tie, kaj sur kio ni bazu nian vivon. Kvankam ni nepre alvenos al maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto, ni deturnas niajn okulojn for de la fakto, aŭ deziras eskapi iel de ili, aŭ nur lamentadas. Vere "*senutile naskiĝon kaj morton ripetanta*" (Dougen) kaj "*vane pasanta*" (Ŝinran) vivo.

"La Tri Rifuĝoj" daŭras ĉi tiel: "Estas malfacile renkonti la budhan darmon, kaj tamen mi ja renkontis ĝin." Kvankam la budha darmo estas malfacile aŭskultebla kaj renkontebla, ni feliĉe jam renkontis ĝin. Tio signifas, ke la vojo estas jam trovita kaj montrita al ni de Ŝakja-munio. La problemo do estas, ĉu ni mem aprobas ĝisnunan manieron de nia vivo, aŭ ĉu ni preferas novan vivmanieron sekvante la budhan vorton. Oni postulas de ni elekton.

"Se mi ne estos savita dum tiu ĉi vivdaŭro, post kiom da renaskiĝoj mi povus savi min?"

Nun estas la sola ŝanco. Se ni diras "iam poste..." nia vivo vane pasas kaj sinkas en la mondon de naskigo-kaj-morto (vivoperdo). Nun ni ekpaŝu!